



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 61** > • AMO 93 • Parmo • Senegalo • Litovio < **novembro 2**

## AMO 93 esploras Eŭrazian Kunlaboron

Jen la prezentaĵo de la prezidanto de IKEF, Ĉielismo (Wang Tianyi). Tiu aldoniĝas al la enkonduka prezento de SMG, aperinta en EKO 59. 13 homoj en Zoom, certe pli el Voov. Ni alkroĉas la prezentaĵon.

### Lernejo en Togolando konigas sin pere de Rotario

Prelego pri Instituto ZAMENHOF.

En oktobro, Instituto Zamenhof de Lomeo Togolando sin prezentis rete al esperantistoj tra la mondo kaj ĉefe al esperantistoj de Rotario-Klubo en Brazilo. S-ro GBEGLO Koffi faris la prelegon.. Bonvolu trovi la informojn en la ligo

<https://rotaryclubdeesperantobrasil.org/2022/10/18/prelego-pri-instituto-zamenhof-gbeglo-koffi/>

### Saĝa Steleto brilas por Esperanto

Ni organizis en Parmo spektadon de Saĝa Steleto sur granda ekrano dum renkontiĝo de la projekto Verden. Ĝi bone funkciis, ĉar la bildoj havas sufiĉe bonan kvaliton por regi tian prezentadon (fakte post ĝi Bruĉjo Kasini decidis uzi ĝin por la instrua projekto de la 30 Oraj Horoj), sed ĝi estis nur por esperantistoj.

En la videoj de la 30 Oraj Horoj, ni faras ion kiel vi priskribis: mi iom enkondukas la ĉefajn temojn kaj rakontas kiel mi faris la animacion + kial en Esperanto. Kaj poste mi faras "lecionetojn" pri gramatiko, uzante kelkajn frazojn de ĝi. Frazoj de animacio estas, fakte, tre facile memoreblaj, ĉar ili estis jam pensitaj por esti facile direblaj.

Tamen estas alia loko, kie ni sukcesis uzi Saĝan Steleton 'merkatiĉe' kiel vi celas: temas pri foiro pri volontulaj asocioj en iu parko de Parmo, kiam pro la kronviruso ne estis permesate renkontiĝi en salonoj ktp. Homoj iris de unu volontula budo al alia. Kaj ni daŭre montris Saĝan Steleton en malgranda komputilo. Kelkaj homoj alproksimiĝis por vidi, pri kio temas. Kaj du junulinoj sidiĝis por spekti ĝin ĝis la fino kaj havis demandojn pri Esperanto ktp. Helpis, ke Saĝa Steleto estis farita de "parmanoj", do ni havis la bildojn kun la voĉoj, sed ankaŭ la verajn homojn tie. Ankaŭ tio estis interesa, ĉar kompreneble neniu alia volontula asocio sukcesis realigi ion similan. Do, tio donis iom da "seriozeco" kaj "konkreteco" al Esperanto.

Alessandra Madella, Italio

## Zamenhofa Tago 2022

Jam cirkulas por komento propono por la ĉi-jara aŭdiŝo, kiun UEA eldonos, pere de sia informa fako ZPI. Certe ZPI volonte ricevos komentojn ankaŭ de la legantoj de la EKO-komunikoj. Sendu viajn komentojn al:

[labor-grupo-pri-informado-de-uea@googlegroups.com](mailto:labor-grupo-pri-informado-de-uea@googlegroups.com)

aŭ rekte al Renato Corsetti  
[renato.corsetti@gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com)

## ILEI-sekcio renovigata en Senegalo

Tio okazas tuj antaŭ la 8-a Afrika Kongreso. Jen informoj pri la renoviga grupo:

Lafi Charles Diatta kiel  
Sekciestro  
Assane Faye  
Ismaila N Dione  
Thiaba Faye  
Ndeye Amy Camara  
Antoine Gomis

Ni baldaŭ kunvenos por renovigi nian sekcion .

*Assane Faye nome de SEA.*

ZAMENHOF-TAGO 2022  
INICIATINTO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO



JUSTA PACO ESTAS TIO, KION LA MONDO BEZONAS.

Tion oni atingas per **dialogo** inter registaroj kaj popoloj

~~~~~

ESPERANTO, la internacia lingvo por dialogo kaj paco estas je dispono de ĉiuj homoj de bona volo. Kiuj volas helpi konstrui pli pacan kaj viveblan mondon.

~~~~~

Legu ĉe [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) kaj kunlaboru kun ni

*spaco por landa, lokaj kaj fakaj adresej kaj kontaktoj*

## Eŭropaj iniciatoj plurlingve

De pluraj monatoj mi faris la retejon [europokune.eu](http://europokune.eu) por konigi al eŭropanoj informojn el Eŭropa Unio kiuj estis haveblaj nur en la angla, aŭ foje en kelkaj aliaj lingvoj. De kelkaj tagoj ankaŭ ekzistas retejo en la hispana : [europajuntos.eu](http://europajuntos.eu). Mi esperas ke ne estas tro da eraroj en la artikoloj. Eble tiu titolo "europajuntos" ankaŭ estus uzebla por la portugala lingvo. Viaj komentoj kaj proponoj por plibonigo estos bonvenaj. Se iuj el vi deziras kunlabori por prepari similajn retejojn en aliaj lingvoj, bonvolu sendi al mi mesaĝojn pri tio.

Vi scias ankaŭ, ke mi faris retejojn en naciaj lingvoj por homoj kiuj ne scipovas Esperanton: [europeensemble.eu](http://europeensemble.eu), (franca), [europagemeinsam.eu](http://europagemeinsam.eu), (germana), [europa-insieme.eu](http://europa-insieme.eu).



**Juna amiko - abonu nun por 2023!**

## Oratora konkurso en VK

Kiel parto de la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) denove okazos Oratora Konkurso por la junularo. Al la 3-a VK eblas aliĝi senpage kiel individua membro de UEA ĝis la 18-a de novembro: [vk.esperanto.net](http://vk.esperanto.net).

La Oratora Konkurso okazos la 25-an de novembro je la 15:00 (UTC).

La konkurso estas malferma al la partopreno de gejunuloj en TEJO-aĝo (malpli ol 36 jarojn), kiuj aliĝis al la 3-a VK. Partopreno estos senpaga, sed la kandidatoj devos skribe anonci sin minimume unu tagon antaŭ la konkursa sesio al la Komisiono de UEA pri Oratora Konkurso pere de la membroj Marc Giraud

<[marc.giraud@orange.fr](mailto:marc.giraud@orange.fr)>

kaj Leandro Abrahão

<[leandro.brazilo@gmail.com](mailto:leandro.brazilo@gmail.com)>.

La partoprenantoj devas elekti unu el la jenaj temoj:

1. Kiam indiĝena lingvo mortas...
2. Indiĝenaj lingvoj pluvivus, se...
3. Mi aparte ŝatas mian indiĝenan lingvon, ĉar...

La parolado daŭros ĝis 10 minutojn en la Internacia Lingvo Esperanto. La kandidatoj devas paroli libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn. La paroladojn oni taksos el vidpunktoj enhava, lingva kaj stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro.

La juĝkomisiono aljuĝos tri premiojn: unua premio estos senpaga aliĝo al la Universala Kongreso en Torino 2023 laŭ kategorio A en la frua aliĝperiodo aŭ 100 eŭroj; dua premio, 75 eŭroj; kaj tria, 50 eŭroj (ĉiuj monsumoj liverotaj kiel aĉetkuponoj por la Libroservo de UEA).

La organizantoj bondeziras partoprenantojn, kaj esperas, ke tiu ĉi kongresero estos tiel populara kaj amase spektata, kiel estas tradicie kaj pasintjare. Kompletata regularo de la konkurso troviĝas en la [retejo de UEA](http://retejo.de.uea). Preparaĝi oni povos i.a. sekvante la kurson de parolarto [#forlaflatado](https://www.udemy.com/course/forlaflatado) senpage ofertata de UEA ĉe [udemy.com/course/forlaflatado](https://www.udemy.com/course/forlaflatado). Kaj legante la librojn pri retoriko en Esperanto [mallonge.net/retoriko](http://mallonge.net/retoriko).

Trovu antaŭajn Gazetarajn Komunikojn en la retejo de UEA:

[uea.org/aktuale/komunikoj](http://uea.org/aktuale/komunikoj)

Rekte: <https://uea.org/gk/1073>

## Junulara Asocio en Litovio



En la bulteno de TEJO 'aktuale' aperis ĉi tiu informo:

La 1an de septembro [LEJO \(Litova Esperanta Junulara Organizo\)](#) ricevis sian juran personecon, kaj jam organizis mojosan LEJO-Feston kun memeejo, gufujo kaj multaj aliaj amuzaĵoj. Ili nun pretigas sian formalan aliĝon kiel landa sekcio!

La informo estas ĝojiga por la Eŭropa Komisiono de UEA, kies tasko estas fortigi la Esperanto-movadon en Eŭropo.

La informon sendis Renato Corsetti

## Du kursoj en Italio

De: [edukado.net](#) <[redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net)>

La redaktoro de [edukado.net](#) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Baza kurso  
Gvidantonomo: Giorgio Denti  
Tipo: Nova movada kurso  
Loko: Romo, Italio  
Aldoninto: Giove

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27471>

Nomo: duagrada kurso  
Gvidantonomo: laura brazzabeni  
Tipo: Nova movada kurso  
Loko: Grosseto, Italio.  
Aldoninto: brazza

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27471>

===== vortoj: 980 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.  
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto